



La bunta ĥameleono

Eric Carle

Libere tradukita de Martin kaj
Nikola Markarian



Tio estas ĥameleono. Ĥameleono povas ŝanĝi sian koloron. Kiam ĝi sidiĝas sur verda folio, ĝi mem fariĝas verda. Grimpante sur arbotrunkon, ĝi mem bruniĝas kiel la arboŝelo. Sur ruĝa floro ĝi iĝas ruĝa. Rampante sur flava sablo ĝi alprenas ties flavan koloron.

Kiam ĥameleono estas feliĉa, ĝi aspektas verda.



Sed kiam ĝi ĉagrenas, ĝi griziĝas.





Kiam ĥameleono malsatas, ĝi ne devas longe kuri por trovi ion manĝeblan, sed simple atendas trankvile movante siajn okulojn: dekstren, maldekstren, supren, malsupren ... ĝis aperas muŝo. Kaj tiam fulmrapide ĝia longa glua lango eliĝas kaj – hap - la muŝo estas for.

Tia estas la vivo de ĥameleono. Ne tre ekscita, ĝis, unu tagon ...



ZOO



... la ĥameleono grimpis sur monteton kaj malkovris la bestoĝardenon je la alia flanko. Neniam antaŭe ĝi estis vidinta tiajn belegajn bestojn.

La hameleono fariĝis terure ĵaluza kaj pensis: kiel mizera kaj malgranda mi estas.

Mi ŝatus esti granda kaj blanka kiel polusa urso !

Kaj ĝi fariĝis polusa urso – nu, iom.



Mi ŝatus esti bela kiel flamenco!

Kaj ĝi fariĝis flamenco – nu, iom.



Mi ŝatus esti saĝa kiel vulpo!

Kaj ĝi fariĝis vulpo – nu, iom.




Mi șatus povi nași kiel fișo!

Kaj ĝi fariĝis fișo – nu, iom.



Mi șatus povi kuri tiel rapide kiel cervo!

Kaj ĝi fariĝis cervo – nu, iom.




Mi ŝatus havi longan kolon kiel ĝirafo!

Kaj ĝi fariĝis ĝirafo – nu, iom.



Mi ŝatus havi karapacon kiel testudo!

Kaj ĝi fariĝis testudo – nu, iom.




Mi ŝatus esti forta kiel elefanto!

Kaj ĝi fariĝis elefanto – nu, iom.



Mi ŝatus esti amuza kiel foko!

Kaj ĝi fariĝis foko – nu, iom.





Sed la ĥameleono ankoraŭ ne estis kontenta. Tiam ĝi vidis du homojn promenantajn tra la bestogxardeno. *Mi ŝatus esti homo !*

Kaj ĝi fariĝis homo – nu, iom.

Ĝi nun estis iom de tio kaj iom de jeno, iom de ĉio. Sed ĝi ne plu estis ĥameleono. Kiam alflugis muŝo, ĝi ne plu povis kapti ĝin. Bedaŭrinde, ĉar ĝi ĵus havis apetiton je eta frandaĵo.



*Mi tiel ŝatus esti
denove mi mem,
diris la bunta
ĥameleono.*

Kaj tio do okazis, ĝi
fariĝis tia kia ĝi estis
antaŭe, kaj kaptis la
muŝon – *hap!*